

ETA



12/1989

REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA

espero katolika

JARKOLEKTO 86 - N. 821 DECEMBRO 1989

Sur la kovrilo: la dolĉa vizaĝo de la "Madonco", la statuo de La Virgulino sur la plej alta pinto de la Katedralo de Milano (Italio)

Karaj legantoj!

Grandaj timoj kaj grandaj esperoj ŝvebas nuntempe super la kristanaro kaj la tuta homaro. Grandaj defioj kaj ŝancoj estas antaŭ ni.

Nia revueto respegulas nur kelkajn aspektojn de sindevigo de la Eklezio en ĉi tia mondo; la aliaj artikoloj koncernas aspektojn proprajn de la kristana vivo.

Kiel vi povas konstati, la artikoloj ĉiam estas frukto de plej diversaj kontribuantoj, kiuj skribas al ni proponante publikigon de artikoloj, meditoj ktp.

Do, la kvalito de nia revuo dependas de tio, kion skribas al ni niaj legantoj ...

La Redakcio

*Periodico culturale mensile - Gruppo III
pubbl. inf. 70% - Gratis ai soci
Monata kultura gazeto*

I. K. U. E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Honora Prezidanto:

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Unua Vicprezidanto: Sac. Lajos Kòbor,
H-9484 Pereszteg, Hungario

Dua Vicprezidanto: Sac. Franjo Gruiĉ, Strossmayerov
trg 5, YU-54400 Džakovo, Jugoslavio

Sekretario-Kasisto:

Antonio De Salvo

Ĝestraro:

A. Beckers, A. Casey, A. Ciccanti, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki, F. Gruiĉ, L. Kòbor, J. Kondor, J. Korytkowski, B. Pochanke, R. Ruaro, S. Szénási

Plenumkomitato:

Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Poterucha; *Ĉeĥoslovakio:* Dlugi, Svaček; *Francio:* Bourdon; *F.R. Germanio:* Eichkorn; *Hispanio:* Casanoves; *Hungario:* Kaszab; *Italio:* Cadei; *Jugoslavio:* vakas; *Nederlando:* Smits; *Pollando:* Kos; *Svislando:* Bommer; *Usono:* Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 75.88.388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo: 30 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo
(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017 Appio, I-00100 Roma RM, Italio
tel. (06) 78.10.782 (vespere)

Redaktoraro: Sac. Battista Cadei, Antonio De Salvo

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

RIGARDU SUPREN, NE MALSUPREN

Jesuo rakontis jenan parabolon por iuj, kiuj memfidis ke ili estas justaj, kaj malestimis la ceterajn:

Du homoj supreniris en la templon, por preĝi: unu el ili estis Fariseo, kaj la alia estis impostisto. La Fariseo, starante, komencis preĝi kun si mem jene: *«Ho Dio, mi dankas vin pro tio ke mi ne estas kiel la ceteraj homoj: rabemaj, maljustaj, adultemaj; kaj ankaŭ ne kiel ĉi tiu impostisto. Mi fastas dufoje ĉiu-semajne, pagas dekonaĵon el ĉio kion mi akiras».*

Male la impostisto, starante malproksime, eĉ ne volis levi la okulojn al la ĉielo, sed li batis sian bruston, dirante: *«Ho Dio, indulgu al mi pekulo».* Mi certigas vin, ke ĉi tiu reiris hejmen justigita, male ol la Fariseo; ĉar ĉiu kiu sin altigas estas humiligota; sed ĉiu kiu sin humiligas estas altigota.

(*Evangelio laŭ Luko 18,9 - 14*)

Vere Jesuo juĝas tre severe pri la fariseo en la parabolo, ĉu ne? La fariseo estas justa homo, kiu vivas laŭ la Dia ordono. Li ne estas rabema, ne maljusta, ne adultema. Li estas piulo laŭ profesio. Li preĝas al Dio, li donas la dekonaĵojn, li fastas eĉ dufoje. Kaj nun li dankas Dion, ke li estas justa homo. Kial juĝas Jesuo tiel severe pri li? Kio mankas al li? Kio ne plaĉas al Jesuo?

Jesuo ne juĝas tiel severe pri li okaze de liaj faradoj. Sed la fariseo estas sinplaĉa, memkontenta homo. Al li mankas la humileco kaj la amo. La fariseo scias, ke li estas bona homo, kiu sekvas la ordonojn de la Eternulo. Li scias, kaj pro tio li sentas sin mem pli bona ol la aliaj homoj. Li rigardas al ili de supre. Li dankas Dion, ke li estas bona homo, sed li ne estas dankema al Dio, ĉar Dio donacis al li la gracon esti bona homo, esti instruita en la Dia ordono ktp. Preskaŭ oni povas diri: li atendas, ke Dio danku lin, ke li obeas al la ordonoj. Kaj oni povas opini, ke mankas al li la amo al Dio kaj al la proksimuloj.

La impostisto, la alia preĝanto de la parabolo, scias sin mem pekulo. Sed li ne malesperas pro tio. Li venas al la templo, al la Eternulo kun siaj pekoj kaj li konfesas sin mem pekulo, kaj li petas la Eternulon pardoni al li la pekojn, li petas la Eternulon pri la donaco de Lia graco. Li malfermas sian koron por la Dia kompatemo, por la Dia amo, por Dio mem. Li ne komparas sin mem kun la aliaj. Li nur rigardas supren al Dio. Li nur rigardas la grandecon de Dio kaj fidas Lian kompatemon. Li lasas sin mem al la kompatemo de la Eternulo. Pro tio Dio povas justigi lin!

Kaj ni? Kaj vi? Kaj mi? Kiu ni estas: ĉu la fariseo aŭ la impostisto? Kiam mi tuj respondus: «*Mi estas ne la fariseo!*», tiam mi verŝajne estas la fariseo. En mia koro mi komencas kompari min kaj la aliajn kaj mi pensas: «*Ne, mi ne estas tiel fiera kiel la fariseo!*». Sed en ĉi tiu momento mi faras la samon kiel la fariseo: mi plialtigas min mem super la aliajn.

Mi opinias, ke vere ni ne volas esti fariseo. Sed en ĉiu el ni vivas la fariseo, kiu ĉiam denove komparas sin mem kun la aliaj kaj sentas sin pli bona ol la aliaj. Ni ĉiuj estas en danĝero, malestimi tiujn, kiuj ne vizitas la Di-servon ĉiudimanĉe, kiuj kritikis la papon, la eklezion, la predikojn de pastroj ktp. Sed ni ofte ne rimarkas, ke ni faras tute la samon. Tio ne signifas, ke ni ne rajtus aŭ devus vidi la malbonon en la eklezio, en la mondo. Ni devas nomi la malbonon «malbono» kaj la pekon «peko», sed ni ne rajtas juĝi pri la homoj, ni ne rajtas komdamni la aliajn. Ni rajtas danki Dion, se ni estas bonaj homoj, sed danki Dion, ĉar Li donacas al ni la bonon kaj protektas nin kontraŭ la malbono. Se ni rigardas supren al Dio, ni rimarkas niajn pekojn, kaj ni nur povas peti Lin: «*Pardonu al ni niajn pekojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj, ni provas pardoni! Helpu nin! Donacu al ni Vian abundan gracon!*».

Jesuo diras ankaŭ pri ni, al ni: «*Li/ŝi revenis al sia domo justigita!*». Li volas diri tion al ni, ĉar Li amas nin abunde. Ni malfermu nian koron, nin mem al Li!

Fratino Theotima Rotthaus, F.R. Germanio


LA FRATOJ DE LA KARITATO

Inter la multaj ordenoj kaj kongregacioj, pri kiuj ni jam skizis la komunajn trajtojn, la Fratoj de la Karitato okupas propran lokon. Ni nun konsideru la ĥarismon (= specialam dian donacon favore al la homfratoj) kaj la specialajn karakterizaĵojn de tiu kongregacio.

La aldonajo "de la karitato" jam multe lasas diveni. La ĥarismo de la karit-religiuloj montriĝas en neprofitema servemo al la kunhomoj kaj precipe al tiuj kiuj estas trafitaj en siaj korpaj kaj spiritaj kapabloj. Laŭ la celo de sia fondinto la Fratoj de la Karitato klopodas plibonigi la vivkondiĉojn de ĉiaj handikapitoj kaj margĉenuloj. Ili aktivas en institutoj por psikiatriaĵ pacientoj, por maljunuloj, blinduloj, surduloj, kripluloj, orfoj, malfacile edukblaj infanoj. Krom tio ili ankaŭ servas en ordinaraj lernejoj elementaj, mezaj kaj profesiaj.

Kiam P.J. Triest fondis la kongregacion, li ĝin nomis: "Fratoj de Sankta Vincento", sed la popolo, vidante ilian bonfaran agadon, lanĉis spontanee la nomon kiu poste estis definitive akceptita: "Fratoj de la Karitato". Aliflanke Kanoniko Triest akiris la honortitolon "Belga Vincento de Paŭlo" kaj la Belga Ŝtato dankeme honoris lin per bela blankamarmora maŭzoleo en la katedralo de Sankta Miĥael' en Bruselo.

Sekvas nun konciza priskribo de la specifikaĵ trajtoj de la fratoj de la Karitato.



Nevidantaj aŭ malforte vidantaj infanoj estas prizorgataj de la Fratoj de la Karitato

1. Ĉar ni volas plenumi niajn karitatajn aktivadojn sur profesia bazo, ni zorgas ke ĉiu frato estu kiel eble plej kapabligata por la tasko al li konfidota. Ni do tre emfazas la profesion formadon. Grava aspekto de nia voto de obeemo estas la devo de ĉiu frato fervore sin kvalifiki por la tasko por kiu la superuloj taksas lin taŭga kaj poste plenumi tiun taskon kun plena sindediĉo.

2. Grava karakteriza kvalito de la Fratoj de la Karitato estis ĉiam ilia simpleco en la kontaktoj kun ĉiuj. Ilia daŭra interrilatado kun simpluloj kaj senhavuloj igis ilin alergiaj je ĉia afektemo. Ili ŝatas sincerecon kaj koran afablecon, taŭgecon sen ornamaĵoj.

3. Ĉiu Frato de la Karitato estu diligenta laborulo. Tio montriĝu ekzemple en ia postulemo je si mem rilate al la libera tempo, la hobiaj, la emeriteco. Tiu sinteno baziĝas sur la idealo de plena sindispono: se estas nur iel eble, ĉiu ajn povas ĉiam ajn kalkuli je liaj manoj, je liaj talentoj.

4. Sed, ke tiu aktivado nepre ne povas kaŭzi malvigliĝon de la spirita vivo, de la preĝo kaj la kontemplado, tion ni jam sufiĉe reliefigis kiam ni parolis pri la monaĥa vivo ĝenerale. La laboro instigu al preĝado.

5. La Fratoj de la Karitato kunvivadas vere frate. Ho certe, en kia ajn kunvivado iufoje estiĝas malglataĵoj. Iom da pacienco kaj humuro utilas al ni ĉiuj, kie ajn ni loĝadas. Ĉiuokaze en nia kongregacio ekzistas jam delonge tradicio de "demokratio", malfermiteco de unu je la alia, solidareco, kunsento kaj reciproka zorgago. Tiu aparteco karakterizas ankaŭ niajn kontaktojn kun niaj helpantoj, kun la parencoj de la pacientoj, kun la gepatroj de la lernantoj. Ni formas kun ili kvazaŭ unu grandan familion.

6. La Fratoj de la Karitato ŝatas bonajn rilatojn kun la ekleziaj kaj civilaj aŭtoritatoj, ĉar tio povas profiti al la homoj kies sorton ili deziras plibonigi. Pro la nuntempaj komplikaj administracioj tre gravas ke ni kulturu bonegajn rilatojn kun ĉiuj, nekonsiderante iliajn politikajn kaj filozofiajn konvinkiĝojn.

7. Fine, ni opinias ke la karitato estas afero de la tuta socio. Pro tio ni konstante strebas al pli ol nur supraĵa kunlaborado kun niaj multaj helpantoj kaj helpantinoj. Ni instigas ilin partopreni en nia ĥarismo, en nia apostolado. Estas ja nur dank' al ilia vigla simpatio por nia kongregacio ke la ideo de la karitato iom post iom trafermentos la tutan socion kaj ke ni ĉiuj kune povos plivastigi la regnon de Kristo surtere.

La Edukado de la Kandidatoj

La formada periodo ampleksas la postuladon kaj la novicecon.

1. La postulado daŭras proksimume ses monatojn kaj celas plian reciprokan konatiĝon inter la kongregacio kaj la aspiranto. La moduloj (kie - kiel - kiam) povas adaptiĝi al la cirkonstancoj. Je la fino de la postulado la aspiranto formale petas esti akceptota por komenci sian novicecon.

2. La noviceco konsistas en la kanonika kaj la apostola jaroj.

a. La kanonika aŭ eklezijura jaro celas spiritan profundiĝon. La kandidato pasigas tiun jaron tute en la novicejo.

b. La apostola jaro celas, krom ankoraŭ spirita pliprofundiĝo, ankaŭ konatiĝon kun la karitataj aktivadoj en pluraj institutoj de la kongregacio.

Je la fino de la novicotempo la kandidato povas esti allasita al la monaĥaj promesoj por tri jaroj. Tiuj ĉi laŭtempe limigitaj votoj estas poste eventuale renovigeblaj, ĉu unu - ĉu maksimume dufoje. Do post tri, eventuale post ses aŭ naŭ jaroj, la frato povas esti allasita al la votoj por nelimitita tempo, tio estas por la tuta vivo.

Depost la unuaj votoj la frato povas esti envicigita en la aktivadojn de la kongregacio, sed ofte li devos ankoraŭ pli sin kvalifiki por sia estonta tasko per plua studado.

Kia ajn estu lia tasko, li ĉiam memoru la devizon de sia kongregacio: “*Dio estas amo*”. Neniu havas pli grandan amon ol tiu kiu donas sian vivon por siaj amatoj. Por ni, Fratoj de la Karitato, niaj amatoj estas ĉiuj helpbezonaj homoj.

Kara leganto, tiom da junuloj kaj junulinoj serĉas la feliĉon kie ĝie ne troviĝas. Nur servema vivo, rezultanta el niaj kristanaj kredo, amo kaj espero povas nin feliĉigi. Aŭskultu la psalmiston:

Serĉu vian feliĉon ĉe la Sinjoro,
Li donas, kion via koro deziras.
Al la Sinjoro konfidu la zorgon de via vivo,
Fidu al Li, Li zorgos pri ĝi;
Kviete atendu, kion la Sinjoro estas faronta,
Konfidu vin tutkore al Li. (*Psa 37*)

Ĉiuj kiuj akceptas ĉi tiun alvokon, jes aŭ ne legantoj de E. K., bonvolu havigi siajn adresojn al la subskribinto por eventualaj pliaj kontaktoj:

Frato G. De Ruyver - Kasteelstraat 46 - B-9660 Brakel - Belgio.

PREĜO DE INFANO

Ke mi estu nun, Savanto,
kiel brila sunradi',
ke en mian hejmon ĉiam
helan ĝojon portu mi.
Ke mi estu nun, Savanto,
kiel pure blanka flor',
kaj por ĉio bona, bela
estu preta mia kor'.
Ke mi estu nun, Savanto,
kiel birdo sur branĉet',
kaj pro via gloro sonu
mia kanto kaj voĉet'.

Elvira Lippe, Latvio

- HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta kaj populara internacia gazeto en Esperanto, estas de 69 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 16 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, duobla Kongresa numero ktp. *Baza jarabono 19 us. dol.* Mendu provokzempleron ĉe la redakcio: *A. Fighiera-Sikorska, Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (Torino), Italio.*

MI VIDAS VIAN SAVON!

Nun lasu, ho Sinjoro,
ke via servanto foriru en paco
laŭ via parolo,
ĉar miaj okuloj ekvidis la Savon,
kiun vi preparis fronte al ĉiuj popoloj:
lumon por revelacio al la mond-gentoj,
kaj gloron por via popolo Izraelo. (*Evangelio laŭ Luko, 2,29-32*).

LA VALORO DE LA PAROLO DE DIO

Pri la valoro de la Dia parolo, la apostolo Paŭlo skribas: " Ĉiu Skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por eduko en justeco, por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona faro " (2 Tim 3,16-17). Analize la parolo de Dio estas utila pro kvar kialoj: ĝi instruas la eternajn verojn pri Dio; komprenigas la realan situacion de homo; korektas la pekulon el ĉiaj liaj eraroj; perfektigas al virta vivo de kredo kaj pieco.

La parolo de Dio simboliĝas en la sankta Skribo per multaj kaj diversaj figuroj, kiuj pruvas ĝian grandan valoron:

1) La parolo de Dio estas kiel **semo**, ĉar, krom la biologia nasko de homo, ekzistas ankaŭ la spirita renaskigo. La apostolo Petro diras, ke Dio renaskigis nin ne per detruenda semo, sed per nedetruenda:

" Renaskite per la parolo de la Dio vivanta kaj restanta eterne, ĉar ĉiu karno kiel herbo, kaj ĉia gloro de homo kiel floro de herbo: sekiĝis la herbo kaj falis la floro; sed la parolo de la Sinjoro restas eterne, kaj tiu ĉi estas la parolo anoncita al vi " (1 Pet 1,23-25).

La Sinjoro mem prezentas sin kiel semanton, kaj la homajn korojn kiel sian kampon, "kultivaĵon de Dio" (1 Kor 3,9), kie li semas la semon, kiu estas "la parolo de Dio" (Luk ,11). Kiel bezonatas semo por natura vivo, tiel nepras la parolo de Dio por la spirita vivo. Kel la malgranda semo enhavas grandan forton, kaj kiam ĝi falas en la teron, donas plantojn, flo-rojn kaj fruktojn, tiel ankaŭ la parolo de Dio, kiam ĝi falas en la korojn, naskigas kaj ĝermigas la fruktojn de Sankta Spirito. Kaj kiel la semo, nur kiam ĝi enteriĝas, releviĝas, tiel ankaŭ la parolo de Dio relevas la pekulon el al tombo de la pasioj. Kaj kiel la tero nekultivata fariĝas sovaĝa, tiel la animo kiu "ne ĝuas disciplinon, elmetas dornojn", diras la sankta Ĥrisostomo.

2) La parolo de Dio estas kiel **lakto**, necesa nutraĵo por spirite su-ĉinfanoj: "kiel ĵusnaskitaj infanoj sopiru la logikan puran lakton, por ke vi per tio kresku en savon" (1 Pet 2,2).

3) La parolo de Dio estas kiel **pano**: La Sinjoro mem nomas sin pano por la spirita kreskado: "Mi estas la pano, kiu desupris de la ĉielo" (Joh 6,41).

4) La parolo de Dio estas kiel **akvo**, kiu sensoifigas kaj purigas: "sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos en eter-no" (Joh 4,14). "Kiel kaj Kristo amis la Eklezion kaj donis sin por ĝi, por sanktigi ĝin per la bano de akvo kun la parolo" (Efe 5,25-26).

5) La parolo de Dio estas kiel **mielo**, kiu dolĉigas la animojn dum la malĝojoj de la vivo: "Kiel dolĉaj estas por mia palato viaj vortoj, pli ol mielo en mia buŝo" (Psa 119,103).

6) La parolo de Dio estas kiel **martelo** disrompanta harditajn kaj senpentajn animojn: "Kiel martelo, kiu disbatas rokon" (Jer 23,29).

7) La parolo de Dio estas kiel **glavo** por disvastigo de la Dia re-gno, aŭ kvazaŭ tranĉilo eniranta internen de la animo por forigi ĉian kan-ceraĵon: "la glavo de la Spirito, kiu estas la parolo de Dio" (Efe 7,17); "la parolo de Dio estas viva kaj evidenta kaj pli akra ol ĉia glavo dutranĉa, kaj penetranta ĝis divido de la animo kaj de la spirito, kaj de artikoj kaj medolo, kaj kritikanta la pensojn kaj la celojn de la koro" (Heb 4,12).

8) La parolo de Dio estas kiel **fajro**, kiu bruligas kaj purigas ĉian putraĵon, kaj neutilaĵon, sed samtempe briligas kaj renovigas ĉiun sanaĵon kaj valoraĵon: " Miaj vortoj estas kiel fajro flamanta, diras la Sinjoro (Jer 23,29); " La paroloj de la Sinjoro estas paroloj ĉastaj, arĝento trafajrigita en tera fandujo, kaj sepfoje refandita " (Psa 12,6).

9) La parolo de Dio estas kiel **spiegulo**, kiu kontroligas la spiritan staton de la animo: " Se estas aŭskultanto de la parolo, kaj ne plenumanto, tiu similas al viro rigardanta sian naturan vizaĝon en spegulo, kiu rigardas kaj foriras, tuj forgesante kia li estas " (Jak 1,23-24).

10) La parolo de Dio estas kiel **lampo** lumiganta la marŝadon de la vivo: " Lumilo por miaj paŝoj via leĝo, kaj lumo al mia vojo " (Psa 119,105).

11) La parolo de Dio estas kiel **pluvo**, kiu revivigas la animon, por ke en ĝi kresku la semo: " Atentu, ĉielo, kaj mi parolos; aŭskultu la tero la vortojn de mia buŝo. Verŝiĝos kiel pluvo mia instruo, kaj desupru kiel roso miaj vortoj, kiel pluvego sur verdaĵon, kaj kiel grandaj gutoj sur herbon " (Rea 32,1-2).

12) La parolo de Dio estas kiel **senbranĉigilo**, kiu forigas ĉiun senutilan vinberbranĉon, pro ke la vinberujo produktu spiritan frukton: " Jam vi estas puraj pro la parolo, kiun mi diris al vi " (Joh 15,3).

13) La parolo de Dio estas kiel **oro**, kiu estas la plej ŝatata valorajo por homo: " Pli bona por mi estas la instruo de Via buŝo, ol miloj da ore-roj kaj arĝenteroj "; " tial mi amis viajn ordonojn pli ol oron, eĉ ol puran oron " (Psa 119,72,127). Ĝi estas trezoro, kiu neniam aĉiĝas.

El tio ni komprenas ke la parolo de Dio estas granda valorajo por la homo. En ĝi ni havas semon, senbranĉigilon, kaj pluvon por kultivi niajn animojn; spegulon, lumilon, fajron, martelon kaj tranĉilon por ilin kuraci kaj kontroli; lakton, panon, mielon, por ilin nutri kaj maturigi. Ĝi estas unika armilo, unika ilo, unika nutraĵo: " ĝi estas potenco de Dio al savo por ĉiu, kiu kredas " (Rom 1,16).

Kaj ni? Kion ni faros?

Johano Kotitsas, Greklando

APERAS LA ISLAMISMO (jaroj 600 - 699)

Eŭropa kristanismo: unueco en diverseco

En la sepa jarcento pludaŭras la kristanigo de Eŭropo, ĉefe per migrantaj monaĥoj-misiistoj, ĉefe irlandaj, sed ankaŭ gaŭlaj, frankaj, ktp.

La monaĥoj evangelizis la mezan kaj nordan parton de la franka regno (nuna Francio) kaj la teritoriojn oriente de Rejno-rivero. En 610 fondiĝis la monaĥejo de Westminster (Londono), de kie monaĥo Paŭleno daŭrigis la evangelizadon de Anglio. Ekde 690 la angla-saksa monaĥo Vilibrordo misiis dum preskaŭ 50 jaroj inter la Frisoj, en la norda parto de Germanio. En Azio la nestoriana monaĥo Olopen eniris en la Ĉinan landon, kie lin favore akceptis imperiestro Tai-Tsung.

La diversnaciaj misiistoj havis diversajn metodojn kaj ritojn laŭ sia deveno kaj laŭ la diversaj lokaj situacioj. Adaptiĝon al la lokaj moroj, kiam ili ne estis kontraŭaj al la evangelio, konsilis papo Gregoro la 1-a. Ekzemple, en la jaro 601 li skribis al la monaĥoj de Anglio leteron pri paganaj temploj kaj manĝoj: « Se la konstruaĵoj estas firme faritaj, estas bone ilin purigi kaj adapti al la kulto de la vera Dio. Kaj ĉar ĉi tiuj popoloj kutimas oferi bovojn al la diablo, estas oportune aranĝi feston por konverti ilian religian sintenon. Fakte ili devas lerni oferi la brutaron ne al la Maliculo, sed al la vera Dio, kaj poste disponi ties viandon por sia nutro. Manĝinte kaj satiĝinte, ili esprimu dankon al la Donacanto de ĉio bona... ».

Tiel konstatigis en Eŭropo « diverseco en la unueco », ĉi-sence, ke oni ja sentas sin en la unueco de la universala eklezio, kies ĉefrolanto estas la episkopo (aŭ papo) de Romo, sed samtempe multaj kutimoj estas diversaj. La liturgio distingiĝas laŭ la vizigota (en Hispanio), gaŭla (Francio) kaj irlandaj ritoj, krom la roma. En la dua parto de la sepa jarcento komenciĝis unuecigo de la rito kaj de la lingvo; estis longa procezo, en kiu la « roma latina rito » malaperigis la aliajn ritojn kaj unuecigis la liturgion de Okcidenteŭropo.

La predikado de Mohamedo

En la sepa jarcento komencis disvastiĝi nova religio, kiu en pluraj lokoj haltigis kaj eĉ retroirigis la kristanisman. Temas pri la islamismo, fondita de la araba Mohamedo (571-632), kiu komencis prediki al la paganaj samnacionoj

novan monoteismon (= unudiismon), prezentante sin kiel profeton de la ununura Dio, eterna, justa kaj kompatema. Laŭ la nova religio « Isa filo de Mirjam » (= Jesuo filo de Maria) estas unu el la profetoj, sed ne Filo de Dio.

La islamismo baldaŭ konkeris la arabajn gentojn, kaj poste disvastiĝis eksterlanden dank' al « sanktaj militoj » por konkeri « malfidelulojn ».

Ekde la jaroj 638-639 la mohamedanoj konkeris tute aŭ parte Palestinon, Sirion, Mezopotamion, Egiption, pli poste Persion kaj Nordafrikon. Inter islamanoj kaj kristanoj komence ne estis militoj aŭ persekutoj (kun kelkaj esceptoj). En oriento oni logas la kristanojn al islamiĝo per favoroj, ekz. senimposteco. En Afriko la situacio estas pli malfacila: la kristanoj, kiuj ne volas fariĝi islamanoj, devas elmigri. La tuta Nordafriko aliĝas al la nova religio, escepte de parto de Egiptio, kie restas monofizitaj komunumoj. En Mezopozamio, Sirio, Palestino kaj Malgrandazio restas kristanaj komunumoj, sed plej granda parto de la loĝantaro aliĝas al la islamismo.

Dokumento: Konvertiĝo de la Angloj (Gregoro la 1-a)

Gregoro la Granda, kiu sendis Aŭgustenon kun 40 monaĥoj, « por ke la Angloj fariĝu anĝeloj », pli poste skribis al Aŭgusteno jenan gratulleteron:

« Gloron al Dio en la altoj, kaj paco al la homoj de bona volo sur la tero, ĉar la tritika semo mortis falante en la teron, por reĝi ne sola en la ĉielo; pro kies morto ni vivas, pro kies senforteco ni fortiĝas, pro kies sufero ni el sufero liberiĝas, pro kies amo ni en Britio serĉas frontojn nekonatajn, per kies donaco ni trovas tiujn, kiujn, ne konante, ni serĉis.

Kiu do sukcesus eldiri, kiom da ĝojo estiĝis ĉi tie en la koro de ĉiuj fideluloj, pro tio ke la gento de la Angloj, per la agado de la graco de Dio ĉiopova kaj per la laboro de via frataro, forpelinte la mallumon de eraroj, briliĝis per la lumo de la sankta kredo; pro tio ke kun purega menso jam nun ĝi piedpremas la idolojn, je kiuj antaŭe ĝi malsaĝa timo subestis; pro tio ke al Dio ĉiopova kun pura koro ĝi kliniĝas; pro tio ke el la ŝaloj de malbonaĝoj nun per la reguloj de la sankta predikado ĝi ligiĝas; pro tio ke je la Diaj ordonoj ĝi spirite submetiĝas kaj mense leviĝas, ĉar ĝisteren ĝi en preĝado sin mallevas, por ke spirite ĝi surtere ne restu. Kiun do ni bezonas, se ne Tiun kiu diris: « Mia Patro ĝis nun laboras, kaj Mi laboras » (Joh 5, 17)?

Li, por montri, ke la mondo konvertiĝas ne per la homa prudento, sed per lia forto, elektis siajn predikantojn, kiujn li sendis en la mondon, malkleraj, kaj tion li faras ankaŭ nuntempe, ĉar inter la gento de la Angloj li deĝnis fari fortajn per senfortuloj. »

ROM SIM!

Eble en la nuna krepuskiĝo de la civilizacio, kiam ŝajnas ke morto kaj timo kaj malamo pli kaj pli alpremiĝas ĉirkaŭ nin, la mondo ankoraŭ havas ion por lerni el la ciganoj koncerne la transvicon, la kapablon releviĝi, la fide-mon je si mem, la kuraĝon, kaj ĉefe la defion je ĝojo.

(Ronald Lee)

“*Rom sim!*” Tion oni povas diri en dek du diversaj manieroj, en dek du diversaj dialektoj de la cigana lingvo, kaj tamen ĝi ĉiam signifas la samon. Esence ĝi signifas: “Mi estas cigano”, kaj ankaŭ: “Mi estas homo”. Sed, en sia plej profunda senco, ĝi asertas ke mi apartenas al popolo, kiu por la ‘alia’, por la ‘gaĝeo’ (= ne-cigano) konsistigas enigmon, konsternan fonton de perplekso, aron da memkontraŭdiroj, eĉ misteron: homoj senhejmaj, kaj tamen hejmaj ĉie ajn; nacio sen patrujo, kaj tamen partoprenas en ĉiu patrujo; popolo sen materiaj rimedoj, kaj tamen tradiciriĉa; homoj senradikaj, kaj tamen plenaj de vivo-ĉarmo ne konata de la homoj malliberaj interne de tiuj kvar (dom)muroj, pro kies konstruo ili tiom penegis; sen skribita historio, kies origino forperdiĝas en nebulo de pratempoj, inter ebenaĵoj, montoj kaj riveroj de Hindujo, kaj eble eĉ pli fore; homoj sen skribita alfabeto, kaj tamen ilia lingvo parolatas tra la kontinentoj - Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio - eble unu el la malmultaj lingvoj vere internaciaj.

“Rom sim” signifas ke neniu lando iam akceptos nin elkore en sia teritorio, tamen ĉiam en ĉiu lando mi havas milojn da fratoj kaj fratinoj, kiujn neniam mi renkontis, kiuj nenion scias ĉi-momente pri mi, sed kiuj akceptos min, tia kia mi estas, en siajn hejmojn kaj en siajn korojn, kiel membron de sia familio: ĉiu rom-o estas mia frato, kaj pro ĉiu rom-o frato estas mi.

* * *

Kiam mi vekigaŝ matene, mi dankas Dion pro la nova tago, ĉar ja Li decidis doni ĝin al mi, kaj Li juĝos min laŭ kiel mi travivas ĝin. Kiam mi eliras serĉe al laboro, mi petas de Dio helpon, ĉar dependas de Li, ĉu mi trovos aŭ ne trovos laboron. Se mi trovas ĝin, mi dankas Dion pro tio; se mi ne trovas, mi dankas Dion, ke Li donis al mi ripoztagon.

Se iu faras al mi viziton, mi salutas lin: “*Vi venis kun Dio*”, kaj la alia repondas: “*Mi trovas vin kun Dio*”; tiel kiam li adiaŭas, mi salutas lin: “*Iru kun Dio*”, kaj li respondas: “*Restu kun Dio*”.

Kiam la suno brilas super mi, mi dankas Lin pro ties varmo. Kiam pluvas, mi dankas Lin, ĉar la akvo purigas min kaj la aeron. Kiam varmas, mi Lin dankas pro ĉiu plej eta ombro; kaj kiam malvarmas, mi dankas pro la varmo de fajro kaj de homrondo ĉirkaŭfajre sidanta.

Iru kun Dio, restu kun Dio, dankon al Dio, se Dio volas: jen la betono kiu kunmentas la lingvaĵon de ĉiu rom-o en lia ĉiutaga irado.

Mi, kiel ĉiu alia rom-o, kredas en Dio, ĉar ni konas Lin. La rom-o ne bezonas serĉi pruvojn pri la ekzisto de Dio; ni scias ke Li ekzistas, ĉar Li ĉiuminute al ni sentigas sian ĉeeston. Sen ĉi tiu certeco, estus tute sensencaj nia mondo kaj nia estonteco.

Laŭ ni ne ekzistas vera morto; ĝi estas nur paso tra ponto de unu al alia mondo. Tiuj, kiuj jam trapasis, atendas nin, por montri ĝin al ni; kiel kiam ni alvenas en novan landon de tiu ĉi mondo, ĉiam estas rom-oj, kiuj nin atendadas, por instrui al ni la morojn de tiu lando. Kaj ni pensas ke en la transa mondo estas ekskluzivotaj kaj malbenotaj tiuj kiuj, malaminte kaj persekutinte la homfratojn, kondukis kiel tiuj kiuj malamis kaj persekutis Jesuon Kriston.

Derek Tipler (Laŭ Radio Vatikana)

MALDILIGENTA LERNANTO PREĜAS

Gardanĝelo, ni devas interkonsenti.

Morgaŭ, dum matematiko, gardu Instruiston por ke li ne ekzamenu min:

ja vi mem scias, ke tiun matĉon oni ne povis ne rigardi.

Por ĵaŭdo mi lernos ĉion perfekte, vi ekvidos, sed hodiaŭ parolu kun Gardanĝelo de Instruisto, ke vi ambaŭ gardu por ke li ne ekzamenu min.

Pro tio nun mi iros dormi, por ke vi jam min ne gardu kaj laciĝu.

Waclaw Oszajca S.J.

(el la pola tradukis Robert Maryks S.J.)

MESAĜO DE INFANO

Vi diras ke mi estas la estonto:

ne forviŝu mian nunon.

Vi diras ke mi estas espero de paco:

ne alkonduku min al milito.

Vi diras ke mi estas promeso de bono:

ne konfidu min al malbono.

Vi diras ke mi estas lumo de viaj okuloj:

ne forlasu min en mallumo.



Jam en frua aĝo ĉinaj infanoj estas hardataj al milito (foto UNICEF)



Aro da infanoj en Caltagirone (*Sicilio, Italio*)

Mi ne atendas nur vian panon:
donu al mi lumon kaj sperton.
Mi ne deziras nur gajesprimon afekcian,
mi petegas ke vi eduku min kun amo.
Mi ne petas de vi nur ludilojn:
mi petas bonajn ekzemplojn kaj parolojn.
Mi ne estas nura ornamaĵo de via vojo:
mi estas homo
frapanta ĉe-porde en nomo de Dio.

Instruu min labori kaj humili,
preĝadi kaj pardoni.
Kompatu min, gvidu min,
ke mi estu bona kaj honesta.
Korektu min siamomente,
... eĉ se vi vidas min ĉagreniĝi.
Helpu min hodiaŭ, por ke morgaŭ
mi ne vin plorigu ...

SPRITA VORTARETO

H

HAZARDO: Eble ĝi estas la kaŝnomo de Dio, kiam li ne volas subskribi
(*A. France*)

HERBAĈO: Planto kun ankoraŭ nekonataj ecoj (*R.W. Emerson*)

HEROO: Homo kiu faras tion, kion li povas (*Romain Rolland*)

HONESTECO: Grava malsano, bonŝance ne kontaĝa (*Anonimulo*)

I

INSULTOJ: Argumento de l' malpravanto (*J.J. Rousseau*)

INTERNACIA KONFERENCO: Kunsido, kiu decidas, kiam okazos la
sekvonta kunsido (*H. Ginsberg*)

J

JUSTICO: La fiksitaj maljustaĵoj (*A. France*)

JUSTICO EGALAS POR ĈIUJ: Pluvas por ĉiuj, sed ne ĉiuj havas ombrelon (*Anonimulo*)

K

KALUMNIO: Pluvo kiu falas sur ĉiujn sukcesulojn (*Voltaire*)

KAPHARO: Afereto kiu forfuĝas, ĉar ĝi timas maljunecon (*Freire*)

KATOJ: La tigroj de l' malriĉulo (*T. Gauthier*)

KIRASKESTO: Aparato, kiu evitas al la ŝtelistoj enuigajn serĉadojn (*Torquet*)

KISO: Pra-mordo lerninta bontonon (*R. Taddei*)

KLARECO: Bontono de verkisto (*J. Renard*)

KLASIKA AŬTORO: Verkisto, kiun oni rajtas laŭdi, ne leginte lin
(*Chesterton*)

KONATULO: Ni konas lin sufiĉe por peti de li monprunton, sed malsufiĉe por pruntedoni al li (*H. Miller*)

KONFUZO: Vorto eltrovita por difini ne-kompreneblan ordon (*A. Bierce*)

KONKERANTO: Entreprenisto de murdoj (*Ariÿss*)

KONSERVATIVULO: Laŭ li nenio devas okazi unuafoje (*Freire*)

KONSULTI: Peti ke oni samopiniu kun ni (*Decourcelle*)

KONVERSACIO: Konkuri en reciproka interrompo (*Pitigrilli*)

KREIVO: Kapablo rigardi per nova okulo malnovajn aferojn (*ĉina proverbo*)

KUKUMO: Frukto laŭgrande kaj laŭenhave simila al homa kapo (*A. Bierce*)

KULTURO: Ĝi estas tio kio restas post kiam oni forgesis la lernitaĵon
(*K. Kraus*)

KURACISTO: Li vivas per la malsanoj, per kiuj la aliaj homoj mortas (*Trébla*)

KURAGO: Timo, kiu rezistas iom pli longe (*R. Taddei*)

ENHAVO

Por sendi monon al IKUE oni bonvolu uzi unu el ĉi tiuj rimedoj:

1) pere de niaj Landaj Rezentantoj (kies adresoj kutime aperas en la lasta paĝo de ĉi tiu revuo);

2) per la itala poŝta konto 23290000, laŭ la adreso: Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (la pago devas esti esprimata en italaj liroj!); el multaj landoj estas eble sendi monon al tiu poŝta konto, sen komplikaĵoj;

3) per internacia poŝta mandato, laŭ la adreso: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (ankaŭ en ĉi tiu kazo, la pago devas esti esprimata en italaj liroj);

4) per itala banka ĉeko, aŭ per internacia banka ĉeko pagebla en Italio; la nomo estu: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (se la ĉeko estas je nomo de IKUE, ĝi estas praktike ne enkasigebla); la pago povas esti esprimata en iu ajn komercebla valuto; por ĉiu internacia ĉeko, oni aldonu 5.000 italajn lirojn aŭ egalvaloron pro bankaj kostoj;

5) per bankaj biletoj, en iu ajn komercebla valuto;

6) per la konto de IKUE ĉe U.E.A. (kodo: Ikue-v).

KRISTANE

- 191 Rigardu supren, ne malsupren
(*Th. Rothaus*)
- 193 La Fratoj de la Karitato
(*G. De Ruyver*)
- 197 Mi vidas vian savon
- 197 La valoro de la parolo de Dio
(*J. Kotitsas*)
- 200 Dudek jarcentoj de kristanismo
- 201 Preĝo de infano (*E. Lippe*)

HUMANE

- 202 Rom sim ! (*D. Tipler*)
- 203 Maldiligenta lernanto preĝas
(*W. Oszejca*)
- 204 Mesaĝo de infano
- 206 Sprita vortareto

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membroabonanto estas 30 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, la sube indikitaj valoroj havas nur informan celon.

Argentino

Daniel A. Cotarelo Garcia
Paysandú 784
RA-1405 Buenos Aires

Aŭstrio

Walter Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III
sil. 250

Belgio

Raymond Lecat
av. Général Eisenhower 123
B-1030 Bruxelles/ Brussel
b. fr. 800

Brazilo

Euclides Carneiro Da Silva
rua Capit. Paulino Freire 366
BR-08-700 Moji das Cruzes/SP

Britio

Roderic Mc Dermott
5 Clapgate Rd.
WD2 SNF Bushey/ Herts
br. p. 11

Ĉeĥoslovakio vakas

Francio

P. Roger Degrelle
12, rue Estienne d'Orves
F-54490 Piennes
fr. fr. 130

F. R. Germanio

József Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D-5450 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726-673
Ludwigshafen Rhein;
g. m. 35

Hispanio

P. Manuel Casanoves, CMF
Roger de Llúria 5
E-08010 Barcelona
pes. 2.200

Hungario

P. Lajos Kőbor
H-9484 Pereszteg

Irlando

Patrick J. O'Reilly
« Monksilver », Howt Summit
Co. Dublin

Italio

UECI
viale C. Zavagli 73
I-47037 Rimini FO
p.k. 11129475; lit. 27.000

Japanio

Hatiro Matubara
Namimatu-tyo 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
enoj 2.700

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg 5
YU-54400 Djakovo

Kanado

Kevin Doyle
1844 Sawmill Creek Cres.
Gloucester, Ont., K1T 2E6
kan. dol. 25

Kolombio

Jorge Velásquez G.
calle 54 no 56-12, apart. 201
Medellín

Madagaskaro

Roger Randrianekena
B. P. 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. José M. Claramunt
apartado postal 318
MEX-68000 Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat 164
NL-2713 VC Zoetermeer
p. k. 685124; gld 42

Norvegio

Stefan Murak
Semsvn 166
N-1370 Asker

Novzelando

G. D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

Franciszka Bardecka
Litewska 24/2
PL-30.014 Kraków
zl. 9.000

Portugalia

Portug. Esper. Asocio
rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
esk. 2.000

Sovetunio

P. Valerijus Rudzinskas
SU-234567 Lazdiu
raj. Rudimina, Litovio

Svazilando

Zoltán Boglári
P.O.B. 1423
Manzini

Svilando

P. Francisco Bommer
Communauté Marianiste
rue du Collège 5
CH-1920 Martigny

Tajlando

P. Marcel Perray
G.P.O. Box 1846
Bangkok 10501

Tajvano/ Formozo (Ĉinio)

P. Ĉi-Sin Chouw Roch
St. Nicolas Church, Pinglin
2320 Taipei Hsien, Taiwan

Urugvajo

Rómulo Zéballos Morales
av. Centenario 3099 « C »,
apt. 805
Montevideo

Usono

P. Kevin Laughery
245 Norh Amos ave.
Springfield
IL-62702-4793
us. dol. 22 - aerpoŝte 30

Zairio

Nsimba Mfumu Ndongala
B. P. 1323
Kinshasa 1